

Bernhard Pabst

## **La 15a regulo**

**Spertoj kaj konsiloj pri terminfarado en Esperanto**

Bonn 2002

Bernhard Pabst: La 15a regulo. Spertoj kaj konsiloj terminfarado en Esperanto.  
Bonn: La auxoro 2002

© cxe la auxoro

## A. Enkonduko

La 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko de Esperanto estas la sola aux almenaŭ la plej grava enir-pordo por novaj „vortoj“ en la Internacian Lingvon. Okupigxante pri la asimilado de vortoj kaj nomoj el la rusa, pola, germana, franca, latina, helena kaj hebrea lingvoj oni trovas abundajn modelojn en la verkoj de Zamenhof. Tamen Zamenhof neniam klarigis siajn principojn. Li ankaŭ ne faris sian laboron sisteme, sed intuicie kaj laŭbezone elektis foje iun principon, foje alian<sup>1</sup>. Formuli cxiam aplikeblajn esperantigajn regulojn pro tio ne eblas, ecx malpli hodiaŭ kiam ni devas respekti bone enkondukitan lingvo-uzon. Tamen eblas elmontri la plej kutimajn metodojn esperantigi „fremdvorton“ aux proprajn nomojn, klarigi la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu aux alia metodo kaj montri modelojn. Jen kiu celas tiu cxi publikigajxo. Ni esperas tiel antaŭenigi la diskutojn pri la „gxusta“ esperantigo, cxiam similajn de jam pli ol cent jaroj.

En tiu cxi libro estas kolektitaj spertoj akiritaj dum la kunlaboro je la projekto „Perkomputora termino-kolekto“ (Pekoteko). Iniciita de Rüdiger Eichholz, gxi estis

- EB
- Slipara Vortaro
- Terminoteko

La fokuso estas sur la ekstera formo de unuopa Esperanta termino. La gxeneralaj problemoj de la distingo inter nocio kaj termino, starigo de nocio-sistemo ktp. estas nur flanke traktata.

Pro koncizeco mi uzas nur la virajn formojn parolante pri la „auxtoro“, „li“, la „tradukanto“ ktp. Tio enklusivas kompreneble cxiam ankaŭ cxiujn „auxtorinojn“, „sxi“, „tradukantinojn“ ktp.

Bonn, 2002

Bernhard Pabst

---

<sup>1</sup> Kp. jam Golden 1979.

## **B. Enhavo**

Enkonduko

La 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko

Gxeneralaj problemoj de terminiko

Planlingvistika filozofio: kian Esperanton ni volas?

Terminfaraj principoj

Cel-konfliktoj inter la principoj

Cxu nova termino estas necesa: La „bujabezo“-problemo

Cxu nova termino estas necesa: La torcxo/fakelo-problemo

Esperantigo de terminoj el la latina

Esperantigo de terminoj el la angla

Esperantigo de terminoj el la germana

Esperantigo de terminoj el la hispana

Literaturo

## C. Mallongigoj

|            |   |
|------------|---|
| (ark)      | arkaigita   |
| (cz)       | cxehxa  |
| (de)       | deutsch, germana  |
| (en)       | English, angla  |
| (evi)      | evitenda  |
| (fr)       | français, franca  |
| (pl)       | polski, pola  |
| AdE        | Akademio de Esperanto   |
| AkSt       | Akademijaj Studoj, Bailieboro, Ontario                          |
| BS 1952    | Butin, Sommer   |
| eld.       | eldono  |
| EBulg 1963 | Esperanto-Bulgara   |
| EPol 1959  | Esperanto-Pola  |
| ESlov 1957 | Esperanto-Slovena 1957  |
| ERus       | Bokarev. Esperanto-Rusa   |
| EV 1923    | Wüster. Enciklopedia Vortaro de Esperanto. Leipzig 1923-1927 ?? |
| <i>f</i>   | feminina ??, in-genra   |
| GWED 1999  | Krause. Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch 1999                |
| kp.        | komparu   |
| LA 196?    | Léger, Albault. franca  |
| <i>m</i>   | maskulina ??, vir-genra   |
| <i>n</i>   | neuxtra   |
| NePIV      | Cherpillod, André. Ne-PIV-aj Vortoj                             |
| n-ro       | numero  |
| OA         | Oficiala Aldono al la Fundamenta Vortaro                        |
| p.         | pagxo(j)  |
| PAG        | Plena Analiza Gramatiko   |
| PIV        | Plena Ilustrita Vortaro 1970                                    |
| PIV2       | Plena Ilustrita Vortaro 2002                                    |
| PM         | Posxatlaso de la Mondo  |
| vol.       | volumo  |

## § 1. La 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko

En la Zamenhofa traduko de la „Plena Gramatiko de Esperanto“ kiel gxi estas trovebla en la Fundamenta Krestomatio de 1903 la 15a regulo tekstas:

La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen sxangxo, ricevante nur la ortografion de tiu cxi lingvo; sed cxe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi sensxangxe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu cxi lasta laux la reguloj de la lingvo Esperanto.<sup>2</sup>

Tio tamen ne estas la originala teksto, sed (Zamenhofa) traduko el la „Fundamenta Gramatiko de la lingvo Esperanto en kvin lingvoj“ trovebla en la Fundamento. La tekstoj en la franca, angla, germana, rusa kaj pola<sup>3</sup> iom malsimilas inter si kaj kompare al la supra traduko. Ne necesas tie cxi detala filologia komparo de la diverslingvaj tekstoj de la 15a regulo, sed sufixas jenaj atentigoj:

La franca teksto krome havas „... ricevante nur la ortografion **kaj la gramatikajn finajxojn** de tiu cxi lingvo („...Ils prennent seulement l’orthographe **et les terminaison grammaticales** de la langue.“) kaj je la fino la klarigan ekzemplon „tragédie - tragedi’o, tragique - tragedi’a“<sup>4</sup>.

La angla teksto havas regulofine la klarigan ekzemplon „teatr’o - theatre, but teatr’a - theatrical, (not teatrical’a), etc.“<sup>5</sup> Simile estas en la germana, rusa kaj pola tekstoj, kie oni trovas la teatro-ekzemplon, tamen sen la negativa ekzemplo \*teatrical’a el la angla versio<sup>6</sup>.

## § 2. Graveco de la 15a regulo

La 15a regulo malfermas la lingvon al estontaj bezono kaj evoluo. Gxi estas la enirpordo tra kiu terminoj por novaj nocioj povas penetri la lingvon, tiel ke gxi dauxre povas plenumi sian rolon de internacia komunikilo por cxiuj sferoj de homa aktivado ankaux en estontaj situacioj hodiaux ne jam konataj.

## § 3. Historia fono de la 15a regulo

Historie la 15 regulo estas reago al la spertoj faritaj per Volapuko, kiu rapide rigidigxis, cxar gxia iniciinto Schleyer klopodis monopoli la decidojn pri necesa pluevoluo je si mem<sup>7</sup>. Gxi krome plenumis du gravajn propagandajn celojn:

Gxi ebligis prezenti Esperanto kiel iuspecan norman euxropan lingvon rilate al kiu la etnaj lingvoj germana, franca, angla ktp. estas kvazaux dialektoj, simile kiel la bavara, sxvaba, rejnlanda povas esti rigardataj subformoj de iu norma germana lingvo<sup>8</sup>. Konsekvenco de tiu perspektivo estas, ke la Internacia Lingvo ne estas iu arte farita monstraĵo, sed kvazaux

<sup>2</sup> Fundamenta Krestomatio, p. 241, represita en PAG, p. 19.

<sup>3</sup> Tiel la intersekvo en la 10a eldono de la Fundamento. Historie aperis unue la rusa, poste la pola, germana, franca kaj fine la angla eldono de la Fundamento. [??]

<sup>4</sup> Fundamento, p. 56. Krome la lingvo estas nomata per sia oficiala nomo „langue internationale“ („internacia lingvo“) dum en la traduko el la Fundamenta Krestomatio Zamenhof uzas la terminon „Esperanto“.

<sup>5</sup> T.e. „teatr’o theatre, sed teatr’a - theatrical (ne teatrical’a)“, Fundamento, p. 61.

<sup>6</sup> Fundamento, p. 67 (germana), 73 (rusa), 79 (pola).

<sup>7</sup> Vd. anstataux cxiuj aliaj nur Blanke, Plansprachen, p. xx.

<sup>8</sup> Kp. la titolon de la verko de Sxulco „Europäische Hochsprache“ (proksimume „Euxropa norma lingvo“).

natura fenomeno. Gxi ne estas inventajxo, sed laux tiu koncepto Zamenhof nur igis videbla iun jam delonge malantaux la euxropaj lingvoj kasxitan metalingvon. Zamenhof tiel disigas Esperanton dis de la aprioraj lingvo-projektoj, ankoraux multe diskutataj en la dua duono de la 19a jarcento<sup>9</sup>.

Krome la 15a regulo ebligis argumenti kontraux la kritiko, ke lingveto kun nur 800 „vortoj“ neniel povus plenumi la rolon de internacia komunikilo en cxiuj sferoj de la homa penso. Al tiuj kritikintoj oni povis respondi, ke la tuta scio- kaj lingvo-trezoro de la „plej evoluigitaj kulturoj“ pro la 15a regulo axtomate apartenas ankaux al Esperanto. Tial suficxus preni iun grandan vortaron de ekz. la franca, apliki la 15an regulon al la trovita vorto kaj jam oni preskaux mirakle trovis la mankantan vorton en Esperanto. Estas evidente, ke temas pri propaganda argumento: tiel simple la afero ne estas ... alikaze ne necesus tiu cxi libro.

#### **§ 4. Diversaj interpretoj de la Fundamento**

Sed ni revenu al la teksto de la 15a regulo mem. Kiu el la diversaj versioj nun estas la axtenta teksto, kiu devas gvidi nin? La respondo al tio kaj al kelkaj aliaj demandoj (cxu ni rajtas aux ecx devas precizigi la 15a regulon per reguloj cxerpitaj el aliaj fontoj? el kiuj? cxu gxi estas la sola vojo por alpreni novajn vortojn? ktp.) forte dependas de nia kompreno pri la rolo kaj funkcio de Esperanto kaj de (plan-)lingvoj gxenerale kaj de la aplikita interpret-metodo de la Fundamento. Cxar tiuj bazaj konceptoj unuflanke estas nur malofte malkasxitaj en lingva kaj pritermina diskuto, kaj cxar aliflanke ili ne malofte anticipas la trovotan rezulton, ni almenaux listu ilin, ecx se detala diskuto pri ili nek eblas nek necesas por niaj celoj. Ni tamen atentigu ke kiel cxiu klasifado kaj provo grupigi iujn konceptojn ankaux tie cxi enhavas iun arbitrecon. Krome la diversaj interpret-metodoj ofte ne estas tiel kristal-klaraj kaj precize disigeblaj kiel pro la mallongo de la prezento povas sxajni. Ni tamen penas redoni la gxustan tendencon.

#### **§ 5. La filologia interpreto de Varenjeno**

Gxi estas la domina, nelaste, sed nur inter alie, pro la granda influo de la filologo Waringhien i.a. kiel kunauxtoro de Plena Analiza Gramatiko (PAG), kiel cxefredaktinto de Plena Ilustrita Vortaro (PIV), kiel prezidinto de la Akademio de Esperanto (AdE) dum decida periodo kaj pro aliaj roloj, kiujn li ludis en la Esperanto-komunumo<sup>10</sup>. Tipe por tiu aliro al la Fundamento kaj la lingvo entute estas, ke gxi okazas tre simile tiel, kiel la germanistiko traktas la germanan aux la romanistiko la latinidajn lingvojn.

#### **§ 6. La skemeca-logika interpreto de Sxulco**

#### **§ 7. La mekanika interpreto de Picx**

Picx kaj la retro-evoluo.

---

<sup>9</sup> Blanke, Plansprachen, p. xx.

<sup>10</sup> I.a. poeto, eseisto, tradukisto, historiisto, Zamenhofologo, k.a., kp. la nekrologon en esperanto xx.

## § 8. La metagramatika interpreto de Makking

## § 9. La kvazaux-jura interpreto de Welger

Gxi estas relative juna interpret-metodo. Welger, juristo kaj psikologo [??], atentigas pri la tradicio de la juda religio, kiu rigardas la sanktajn skribojn kvazaux legxo. Tiun tradicion Zamenhof pro familia fono kaj eduko alproprigus al sia pens-maniero. Gxi gvidis lin kiam li formulis la Fundamenton. xx Por Welger la auxtenta teksto do estas la Fundamento en la formo kiel gxin alprenis la Bulonja Deklaracio de 1905.

## D. Terminfaraj principoj

### § 10. Cxu nova termino necesas?

Verkante en aux tradukante al Esperanto oni ne malofte eksentos, ke trafa esprimo ne tuj estas cxemane. Aux vorto mankas entute aux oni nur povas pensi pri relative gxenerala termino, sed sentas, ke gxi iel ne redonas la deziratajn detalojn aux etoson de la etnolingva termino pri kiu oni pensas. Oni rapide kontrolas en sia preferata etnolingva - Esperanta vortaro. Ne trovante ekvivalenton oni emas kredi, ke oni jxus malkovris gravan deficiton de Esperanto, kiu necesas forigi per krea akto. La lauxdo kaj honorigo de la posteuloj certos.

Mi tamen avertas: Ofte la manko estas nur sxajna kaj kauxzita de la nesuficxa esperanta vortotrezoro de la ambicia auxtoro.

Ofte mankas suficxe largxa fono en la gepatra aux cxiutaga lingvo de la auxtoro. Ni imagu, ke li sercxus tradukon por la germana „Lücke“ kaj ne trovus tiun vorton en sia vortaro. Pensante pri germanaj preskaux-sinonimoj kiel „Mangel“ aux „Defizit“ li auxtomate kaj ecx sen helpo de la vortaro venus al la eblaj esperantigoj „manko“ aux „deficito“. Tiujn li povus kontroli en PIV, ekz. por esti certa, ke „deficito“ ankaux eblas uzi en la gxenerala senco de „Lücke (im Wörterbuch)“ aux nur en la speciala senco financa. Rapide li konstatus, ke manko pri la koncepto „Lücke“ ne ekzistas en Esperanto. Tiun pensadon pri (preskaux-)sinonimoj en la fontolingvo oni tamen devas trejni. Bona helpo povas esti konsulti sinonim-vortaroon (tesauxron) de la fontolingvo.

Ofte la emo krei rapide novan terminon ekestas nur pro tio, ke oni ne volas aux pro tempo-manko ne povas kontroli en aro da eblaj fontoverkoj. Kontribuas al tio la gxenerale ne kontentiga stato de la esperanta leksikologio. Aktualaj kaj detalaj vortaroj de tipo etnolingvo - Esperanto mankas por multaj lingvoj. PIV mem estas jam suficxe neaktuala kaj gxia Suplemento devigas la leganton kontroli en plia kajereto. Tiuj malfacilajxoj tamen ne liberigas sinceran auxtoron de la devo skrupule konstati unue, cxu bezonata esprimo ne jam ekzistas en gvidaj vortaroj aux alimaniere dirite konvinkigxi, cxu vere ekzistas iu manko forigenda. Simple ne trovi deziratan vorton en gxenerala vortaro aux siafaka terminaro estas baza, „metiista“ eraro nepardonebla, kvankam bedausrinde suficxe ofta. Almenaux se oni verkas fake aux ecx kunigas terminaron gxi ne rajtas okazi. Apud tiaj klaraj misoj ekzistas alia grupo de termino, pri kiuj ne eblas same facila jugxo. Mi nomas la problemon la „golpo“-fenomeno.

### § 11. La „golpo“-fenomeno

Pri kio temas, montras jena nocio-komplekso el Pekoteko (n-ro 89/pb-1883):

{eo1} **golp\*\*/o** \*a EVIT \*b\*c\*e

{eo2} **pucx/o** \*cx

{de1} Putsch *m* \*c  
 {de2} Staatsstreich *m* \*c  
 {en1} putsch \*d  
 {es1} golpe *m* de Estado \*c  
 {fr1} coup *m* d'état \*c  
 {it1} golpe *m*

Subita ribelo de militistoj kontraux establita registaro. *La sxtatprezidento estis forigita per ~o gvidata de arma generalo.*

Fon: \*a Monato 1989/3, p. 11; \*b pb; \*c ei; \*cx PIV; \*d WE; \*e du;  
 89/pb-1883

La termino „golpo“ estis uzata en Monato en 1989. La redaktisto Stefan Maul poste klarigis, ke li uzis la vorton, „cxar gxi iel sonis brutale al liaj oreloj“. Tamen ne eblas klara diferencigxo inter la difinoj de „golpo“ kaj la PIV-a „pucxo“. Ili fakte estas sinonimoj. Pro tio „golpo“ sxajnas al mi superflua kaj evitenda. Pri tiuj paralelaj terminoj, kiuj principe estas same „bonaj“, ekzistas la dangxero, ke hispan- kaj itallingvanoj uzas la terminon „golpo“ proksime rilatitan kun tiuj lingvoj, dum angla- kaj germanlingvanoj uzas „pucxon“, kiu proksimas tiujn lingvojn. Ambaux grupoj tamen celas la saman nocion. Tiel ekestas la dangxero de dis-dialektigxo aux pli precize de dis-variantigxo. Unueca lingvo-uzo laux mi pli gravas ol la speciala (subjektiva) efiko havi en certa situacio iun „brutalan“ terminon. Pro lingva disciplino ni do unuece sekvu la jam enradigxintan modelon de PIV kaj nur uzu la formon „pucxo“.

Jen kelkaj pliaj ekzemploj de duoblajxoj, kun sama aux preskaux sama signifo, sed czerpitaj el malsamaj fonto-lingvoj. Mi ordigas ilin alfabete laux la oficiala aux pli tradicia (ekz. PIV-a) formo:

| tradicia  | neologisma      | fonto  |
|-----------|-----------------|--|
| averti    | varni           | de germana <i>warnen</i> , BS 1952, EPol 1959, EBulg 1963,                     |
| benzino   | gazolino        | de franca <i>gazoline</i>  |
| ekrano    | skreno          | de angla <i>screen</i>   |
| epoza     | epika           | de franca kaj germ. <i>épique, episch</i>                                      |
| gicxeto   | vazitaso        | 90/ac-????   |
| hecxo     | heko            | de germ. <i>Hecke</i>  |
| kolbaso   | vursto          | de germ. <i>Wurst</i> , Christaller 1923, Filip 1947, ESlov 1957, EBulg 1963   |
| kreski    | vaksi           | de germ. <i>wachsen</i> , uzata de Zamenhof en la rusa eld. de la 1a Libro (!) |
| lavi      | vasxi           | de germ. <i>waschen</i> , Vatré 1987   |
| lugxi     | rodli           | de germ. <i>rodeln</i>   |
| narkoti   | drogi           | de franca <i>droguer</i>   |
| nekropsio | obdukcio        | 89/pb-1839   |
| ofte      | sovente         | de franca <i>souvent</i>   |
| rajti     | darfi aux durfi | de germ. <i>dürfen</i>   |
| tago      | jxurno          | de franca <i>journalée</i> .   |
| torcxo    | fakelo          | de germ. <i>Fackel</i>   |
| triktrako | bakgameno       | de angla <i>backgammon</i>   |
| vojstreko | vego            | de germ. <i>Weg</i> , 90/ac-????   |

Cxu cxuiuj tiuj duoblajxoj estas evitendaj? La respondo dependas de la propra termin-fara „ideologio“ kaj eble nur de ies gusto. Oni tamen povas distingxi jenajn grupojn:

### 1. Arkaismaj duoblajxoj

Kelkaj el la cititaj duoblajxoj estas simple iam konkurence proponitaj aux uzitaj formoj, kiuj „perdis“ kontraux alia formo. La plej konata ekzemplo estas fakelo<sup>11</sup>, unu el la malmultaj veraj arkaismoj en Esperanto, apud ekz. konkiro (konkero) aux bicikledo (biciklo) kaj la Zamenhofa vaksi (kreski). Al tiu kategorio probable ankaux apartenas „varni“. Vursto, unue registrita cxe Christaller 1923 povus aparteni al tiu kategorio. Christaller klarigas, ke la termino estis „uzita de la Loka Komitato de l' Praga kongreso“ kaj ke „oni povas uzi gxin por malgrandaj kolbasoj“<sup>12</sup>. El tio sekvas, ke li tamen ne proponis gxin anstauxig-cele, sed distinge. Eble do tiu ekzemplo pli bone apartenas al la dua grupo de nesinonimoj.

### 2. Ne-sinonimaj duoblajxoj por distingi naci-kulturajn apartajxojn

Plej ofte la proponintoj aux defendantoj de tiaj duoblajxoj argumentas, ke tute ne temus pri evitendaj sinonimoj, sed pri specialiga kaj konkretiga termino necesa. Tiel ekz. vursto povas esti difinita jene: „Mallonga, dika kolbaso laux germana maniero“<sup>13</sup>. Per tio estigxas nocio-sistemo: Kolbaso estas la gxenerala nocio, vursto kaj cervelaso du el siaj subformoj, tute simile kiel en la kazo de pregxejo unuflanke kaj moskeo, sinagogo kaj kirko (k.a.) aliflanke:

| kolbaso                      |                              |                            | pregxejo       |               |                   |
|------------------------------|------------------------------|----------------------------|----------------|---------------|-------------------|
| vursto                       | salamo                       | cervelaso                  | moskeo         | sinagogo      | kirko             |
| kolbaso laux germana maniero | kolbaso laux hungara maniero | kolbaso laux itala maniero | islama pregejo | juda pregxejo | kristana pregxejo |

Se vursto estas difinita en tiu aux simila maniero, la termino povus esti pravigita. Cxu entute estas dezirinde havi en Esperanto apartajn terminojn por lauxeble multaj subformoj el naciaj kulturoj estas pridisputata. Ni traktas la temon sub la sxlosil-vorto „bujabeso-problemo“. Gxin ni renkontas precipe cxe mangxajoj, trinkajxoj, vestajxoj ktp. el diversaj kulturoj de la mondo.

Tamen restas la dangxero, ke germanlingvanoj ne farus tiun enhavan distingon, sed uzus la terminon „vursto“ en la gxenerala senco de „kolbaso“. Tiukaze denove ekestus la nedezirebla kaj lauxeble evitinda dangxero de disvariantigxo kiel montrite supre cxe la pucxo/golpo-ekzemplo. Tio precipe, cxar en la germana Wurst estas la nomo de la klaso (same kiel kolbaso en Esperanto) kaj ne de iu elemento el la klaso, kiel ekz. Salami, Zervelatwurst, Blutwurst ktp. Kaj plian problemon oni povas montri „per la vursto“. Ni supre iom sxangxis la difinon de vursto. Surbaze nur de la difino de Christaller (malgranda kolbaso) la konfuzeblo estas ecx pli granda, cxar la distinga kriterio estas suficxe elasta kaj neklara, eble ecx harfenda. Tio estas tipa por la ekzemploj el la tria kategorio.

### 3. Kvazaux-duoblajxoj kun semantike tre similaj signifo

Al tiu grupo mi kalkulas la ekzemplojn rodli kaj vasxi. Se mi bone komprenas, la diferenco inter lugxi kaj rodli estas, ke la unuan oni faras en sporta konkurso la duan pli hobie, lude. Ekestas la demando, cxu ??

Vasxi sxajne estis uzata nur foje de Picx kaj registrita de Vatr . Laux tiu fonto gxia signifo estu „lavi tolajxon“. Eble Picx en „Klacxejo“ simple volis varii la esprimojn, kiel estas iom karakteriza de lia stilo. Klarig-cele ni tamen supozu, ke iu opinias necese distingi lavi en gxenerala senco de lavi tolajxojn kaj fari tion ne per aldona klarigo, sed per propra termino.

<sup>11</sup> Golden AkSt 1988-90, 110-114.

<sup>12</sup> Christaller 1923, p. 658.

<sup>13</sup> Kp. Vatr  1987.

Kio okazas? La semantika kampo de lavi estas dividita kaj parto, kiu gxis nun apartenis al gxi sxovita sub la tegmento de alia (nova) termino:

| lavi            |         |                                  |             |             |
|-----------------|---------|----------------------------------|-------------|-------------|
| al si la manojn | infanon | oron                             | tolajxojn   | auxton      |
| en ordo         | en ordo | cxu necesas propra termino? Kiu? | cxu: vasxi? | ne!: purigi |

Cxu oni opinias tion dezirinda aux ecx necesa unuflanke forte dependas de la etno-lingvaj kutimoj. Germanaj infanoj lernantaj la anglan ofte miras, ke la sekso ne estas klara en la frazo „a friend sent me a letter“. La strange „neprezica“ angla ne klarigas, cxu estis amiko aux amikino, kiu sendis leteron. Kaj jen vere baza diferenco. Aliflanke la samaj lernantoj miras pri la „pedanteco“ de la franca, kiu distingas inter „je peux nager“ (cxar la vetero estas bona) kaj „je sais nager“ (cxar mi lernis nagxi lastan someron), strukturo kiun oni ofte klopodas imiti en Esperanto per „mi povas nagxi“ kaj „mi scipovas nagxi“, distingo kutime ne ekzistanta en la germana (normale en ambaux kazoj nur „ich kann schwimmen“). Lasta ekzemplo el la hispana, kie oni devas distingi inter „ser“ (esti) kaj „estar“ (trovigxi), dum en la germana kutime nur estas „sein“ (esti). Do la dezirata grado de precizeco en certa situacio certe estas influata de la etnolingvaj kutimo kaj modelo.

Aliflanke gxi povas vari laux la bezono, ekz. esprimi sin lauxeble science precize (kio povus pravigi minejan fakvorton por ekz. „lavi oron“).

Kiu do estas la sekvinda vojo en Esperanto? Nu, gxi certe ne povas transpreni cxiujn distingojn de la etnaj lingvoj. Ju pli fajne oni devas distingi inter kategorioj trovigxantaj tre proksime unu apud la alia des malpli facile la lingvo farigxas. Sxajnas ke estas pli facile uzi gxeneralan esprimon kaj lasi la klarigon al la kunteksto respektive al aldona klariga elemento. Pri „vasxi“ mi cxiukaze opinias, ke gxi estas nenecesa. Pro la argumentoj donitaj supre cxe kolbaso/vursto mi krome pensas, ke „vasxi“, ecx se oni jesus la neceson distingi la lavadon de tolajxoj per propra termino dis de la lavado de korpopartoj ktp. gxi cxiukaze estus netauxga. Simile kiel klarigita cxe vursto ankaux vasxi en la germana kovras la largxan kampon de lavi kaj ne nur specialigitan subkampon. Gxi do estus falsa amiko por germanlingvanoj kaj jam pro tio netauxga.

Devas ekzisti kaj precizaj, konkretaj kaj vastaj, gxeneralaj terminoj. Tro granda precizeco tamen ofte ne estas necesa kaj malfaciligas lingvon. Jen kio montris la pli preciza sed ankaux pli komplika afiksa sistemo de Ido kompare kun tiu de Esperanto. Kial fari nenecesan distigon klarigebla de la kunteksto en 100 % da kazoj, kiam la senco postulas tion eble nur en 10 %?

Gangolf Nitsch, Sprachentwicklung und Neologismen im Esperanto, Graz: "Pro Esperanto" 1989, cxapitro 10.6 (p. 20) donas teorion pritrakton de nia problemo.

Ankaux Nitsch kritikis tiujn paralelajn duoblajxojn kaj postulas pli da memdisciplino en la literatura traduko kaj literaturo kontraux la tendenco krei cxiam pliajn tiajn formojn (p. 21). Mi plene kunsentas.

”ei•: Mi plene subtenas tiujn rimarkojn de ”pb•: Ni enkonduku neologismajn radikojn nur, se oni povas per ili pli klare esprimi alian nocion.

#### 4. Duoblajxoj por ofte uzataj mal-vortoj

Specialan pritrakton necesigas la paralelaj formoj al la *mal*-vortoj kiel:

maljuna

olda

|            |                   |
|------------|-------------------|
| maldekstra | lefte, liva, lifa |
| malmultaj  | pokaj             |
| malofta    | rara              |

Tradicie ili estis proponitaj kiel literaraj terminoj. La argumento estas, ke legante ekz-e la vorton „maljuna“ oni ne tiel rekte asocius la malon de juna, kiel se oni legus „olda“. Tio komencigxis en la literatura Budapesxta skolo de la 1920-aj jaroj kaj estas vaste uzata de la auxtoroj de la Iltisa skolo, ekz-e de Karolo Picx. Sed aldonigxis pliaj argumentoj el teknika lingvajxo, ekz-e kiam klaraj kaj mallongaj ordonoj en strat- aux aer-trafiko estas bezonataj: *deks! liv!* aux kiam mnemonataj ordonoj en komputora lingvajxo estas dezirinda<sup>14</sup>.

## § 12. Superrigardo pri la diversaj vojoj krei novan terminon

Se, kaj nur se, ni konstatis, ke ekzistas „truo“, manko en la vortaro nepre forigenda, ekestas la demando, per kiu metodo krei novan ne jam registritan terminon. Jen la bazaj vojoj:

1. Plilargxigo de la senco de jam ekzistanta radiko, eble kun aldona distinga atributo.
2. Pauxsado de la semantika enhavo de la fontolingva termino.
3. Transskribo (asimilado) de la fontolingva termino,
  - a. surbaze de la skriba formo de la originala vorto (grafisma transskribo)
  - b. surbaze de la parola formo de la originala vorto (fonetisma transskribo)
  - c. kompromiso inter ambaux metodoj
4. Kreo de propra semantika bildo surbaze de ekzistantaj radikoj

## E. Esperantigo surbaze de kiu lingvo?

### § 13. : Esperantigo de urboj kaj etno-nomoj: La Dancigo-problemo

Esperantigo surbaze

|                       |                        |
|-----------------------|------------------------|
| Breslauxo (de:        | Vroclavo (pl:          |
| Breslau)              | Wroclaw)               |
| Dancigo (de: Danzig)  | Gdansko (pl: Gdansk)   |
| Monastero (la:        | Munstero (de:          |
| Monasterium)          | Münster)               |
| Ratisbono (fr:        | Regensburgo (de:       |
| Ratisbonne) ??        | Regensburg)            |
| Varsovio (fr:         | Varsxavo: (pl:         |
| Varsovie)             | Warszawa)              |
| Budapesto (de:        | Budapesxta (hu:        |
| Budapest [pron. „s“]) | Budapest [pron. „sx“]) |
| vasko (es: vasco)     | euxsko (eux: ??)       |
| eskimo                | inuito                 |
| Hindujo               | Barato                 |

<sup>14</sup> Detale Albaut xxx en Scienca Revuo 1968 ??, Monato xxx Kp. ankaux [Pabst] en Terminoteko xxx.

**§ 14. Esperantigo de historiaj person-nomoj surbaze de latinigita formo: La Kantio-problemo**

| etno-lingva formo | latinigita formo | Esperantigo surbaze de la latinigita formo | Esperantigo surbaze de la etno-lingva formo (ne rekomendinda) |
|-------------------|------------------|--|---|
| Kant (de)         | Kantius          | Kantio [PIV2]                              | Kanto (evi)   |
| Descartes (fr)    | Cartesius        | Kartezio ?? [PIV2]                         | Descarto (evi)  |
| Louis XIV (fr)    | Ludovicus        | Ludoviko XIVa                              | Luizo ?? (evi)  |
| Komensky (cz) ??  | Comenius         | Komenio                                    | Komensko (evi)  |
| Kopernik (pl) ??  | Copernicus       | Koperniko                                  | Koperniko   |

**§ 15. La „bujabeso“-demando**

**§ 16. La graveco de etimologia gxusteco: La ajatolo/ajatolaho-problemo**

**F. La radiko-komenco**

**§ 17. Transskribo de grek-devena pseuxdoprefikso „holo/“**

La grek-devena prefikso „holo/“ signifas „tute“, „komplete“. PIV ne aparte difinas gxin tiel, kontraste ekz. al anti/ aux xx . Gxi aperas en aro da internaciaj vortoj, ekz.

|             |      |
|-------------|------|
| holoedro    | PIV  |
| holografio  | PIV  |
| holografo   | PIV  |
| hologramo   | PIV  |
| holokauxsto | GWED |
| holomorfa   | GWED |

En la esperanta-franca vortaro de Grosjean-Maupin el 1924 (kaj „malkovrita“ nun en Vatré de 1987) gxi estas transskribita per „olo/“ (olografa) laux la franca prononco sen la komenca „h“. Tio estas evitinda francismo arkaa, en moderna Esperanto ni transskribu unuece per „holo/“ gardante la komencon „h“.

Oni cetere povas rigardi tiun kazon kiel plia ekzemplo por la demando, el kiu lingvo oni transprenu vorton, kiun etimologion oni respektu (vd. pri tio § xx).

**§ 18. Transskribo de latina sufikso „-um“**

**§ 19. Transskribo per radik-komenca -k- aux -hx-: La kmero-problemo**

|       |               |      |           |
|-------|---------------|------|-----------|
| kmero | hxmero [PIV2] | Kmer | azia etno |
|-------|---------------|------|-----------|

|  |  |  |  |
|--|--|--|--|
|  |  |  |  |
|--|--|--|--|

## § 20. Cxu gardi etnolingvan artikolojn: La Valetto/Lavaletto-problemo

Kelkaj propraj nomoj de urboj aux personoj precipe el latinidaj lingvoj etnolingve estas kutime cititaj kun difina artikolo: *La Chaux-de-Fonds* (svisa urbo), *La Valletta* (regurbo de Malto), *Le Corbusier* (franca arkitekto), *La Coruna* (urbo en Hispanujo<sup>15</sup>). Kiel asimili tiujn formojn en Esperanto? Ni trovas kvar vojojn en Esperanto-vortaroj:

1. la etnolingva artikolo estas forlasita en la Esperanta formo
2. la etnolingva artikolo „la“ estas rekte tradukita per la Esperanta artikolo „la“
3. la etnolingva artikolo estas kunigita kun la radiko per streketo
4. la etnolingva artikolo estas integrita en la Esperanta radiko

| sen artikolo<br>(1) | artikolo disigita<br>(2) | artikolo kun streketo<br>(3) | artikolo integrita<br>(4) |
|---------------------|--------------------------|------------------------------|---------------------------|
| Sxauxdefono [PIV2]  |                          |                              |                           |
| Valetto             | La Valetto [PIV]         | La-Valetto [PIV2]            | Lavaletto [PM]            |
| Korbuziero          |                          |                              |                           |

Mi konsilas preferi solvon (1) kaj forlasi la etnolingvan artikolon. Granda malavantagxo de modeloj (3) kaj (4) estas, ke oni devas sercxu la vorton en Esperanto-vortaro sub alia litero ol tiu, per kiu komencigxas la radiko de la vorto, ekz-e do Lavaletto sub „L“ anstataux sub „V“. Krome solvo (4) malfaciligas la spontanee rekonon. Se la etnolingva artikolo tamen farigxis integra parto jam de la fremdlingvo, t.e. ankau en la fremdlingvo nur plu etimologie estas rekonebla kiel artikolo, gxi kompreneble estas transprenita same en Esperanton: Gxuste do Lavuazjero [NePIV] por *Lavoisier* (franca kemiisto).

## G. La radiko-fino

### § 21. Falsaj parencoj

La terminon „falsaj parencoj“ mi uzas tie cxi por jena fenomeno: xxx  
*Cxiuj* klasikaj vortformaj finajxoj en Esperanto havas falsajn parencojn<sup>16</sup>: delfino kompreneble ne estas delf/ino. Se ni sercxas la plej bonan Esperantan vestajxon de fremdvorto en la senco de la 15a regulo, ekestas la demando, cxu ni akceptu la eblan kolizion aux cxu ni evitu gxin kaj se ni penas eviti gxin, per kiu rimedo.

Cxu ekz-e kaseto aux kasedo (-et/-ed), cxu delfino aux delfeno (-in/-en), cxu xxx (-ul/-ol), cxu pulovero aux pulovro (-er/-r), ktp.

### § 22. -et/-ed

Vd. Pabst en AkSt 1988-90.

|            |                 |  |  |
|------------|-----------------|--|--|
| ballet     | baledo          |  |  |
| bicyclette | bicikledo (ark) |  |  |
| buffet     | bufedo          |  |  |

<sup>15</sup> Pri tiu vd. detale Golden 1993.

<sup>16</sup> Vd. jam Schlüter, enkonduko al Inversa Vortaro.

|          |                 |  |  |
|----------|-----------------|--|--|
| chalet   | cxaledo         |  |  |
| cassette | kasedo          |  |  |
| couplet  | kupledo         |  |  |
| libretto | libredo [EBulg] |  |  |
| navette  | navedo          |  |  |

### § 23. -in/-en

|         |         |                                |            |
|---------|---------|--------------------------------|------------|
| delfino | delfeno | Delfin (de), dolfin<br>(en) ?? | mar-mamulo |
|---------|---------|--------------------------------|------------|

### § 24. xxx: La pulovero/pulovro-problemo

|                   |         |  |                |
|-------------------|---------|--|----------------|
| bitero [EV, PIV2] |         |  | (Magen-)Bitter |
| pulovero          | pulovro |  | pullover       |
| svetero           | svetro  |  | sweater        |

### § 25. Cxu gardi radikfinan -a: La Gano/Ganao-problemo

|         |         |          |                      |
|---------|---------|----------|----------------------|
| Ghana   | Gano    | Ganao    | Afrika sxtato        |
| Bambara | bambaro | bambarao | Afrika etno en Malio |

### § 26. Cxu gardi radikfinan -aci, -ici, uci?

La -aci-vortoj estas transkriboj el la (oftaj) in-genraj latinaj vortoj je -io/-ionis, ekz-e natio, nationis *f* (nacio) aux declaratio, declarationis *f* (deklaracio / deklaro).

|                    |            |         |
|--------------------|------------|---------|
| declaratio, -ionis | deklaracio | deklaro |
|--------------------|------------|---------|

### § 27. Cxu gardi radikfinan -ik?

Golden en AkSt ??

### § 28. La -ifik-vortoj: La klasifiki/klasifi/klasi-problemo

La latina sufikso -ifik/ devenas de facere (fari) kun sxangxo de la vokalo de „a“ al „i“ en kunmetajxoj. En la modernaj lingvoj gxi farigxis ekz-e -ifieren (de), -ifier (fr), -ify (en) Jen kelkaj ekzemploj:

|           |         |
|-----------|---------|
| klasifiki | klasifi |
| notifiki  | notifi  |
| ratifiki  | ratifi  |

## H. Problemoj de transskribo el la angla

Baseball

## I. Problemoj de transskribo el la germana

### § 29. Transskribo de germana „-ei-“: La Einstein-problemo

Oni povas observi almenaŭ kvar diversajn metodojn transskribi la germanan diftongon -ei- (germane prononcata „aj“).

| nacia skribo             | fonema<br>> -aj-                      | grafema<br>> -ej-                 | redukto al<br>simpla -i- | redukto al<br>simpla -e- | klarigo   |
|--------------------------|---------------------------------------|-----------------------------------|--------------------------|--------------------------|---|
| Eifel                    |                                       | Ejfel <sup>17</sup>               |                          |                          | franca arkitekto;<br>germana montaro            |
| Einstein                 |                                       | Ejnstejn <sup>18</sup>            |                          |                          | matematikisto                                   |
| Einsteinium              |                                       | ejnstejnio <sup>19</sup>          |                          |                          | transurania<br>elemento                         |
| Frankenstein             |                                       |                                   |                          |                          | literatura figuro,<br>monstro; germana<br>monto |
| Hallstein                |                                       |                                   |                          |                          | politikisto kaj<br>diplomato                    |
| Holstein                 |                                       |                                   | Holstinio <sup>20</sup>  |                          | germana regiono                                 |
| Leibniz                  | Lajbnico <sup>21</sup>                | Lejbnico <sup>22</sup>            |                          |                          | germana filozofo                                |
| Leipzig                  |                                       | Lejpcigo <sup>23</sup>            |                          | Lepsiko <sup>24</sup>    | germana urbo                                    |
| Lichtenstein             |                                       | Lihxten-<br>sختهjno <sup>25</sup> |                          |                          | euxropa sxtato                                  |
| Rhein                    |                                       | Rejno                             |                          |                          | rivero  |
| Steinhuder<br>Meer       | lago<br>Sxtajn-<br>huda <sup>26</sup> |                                   |                          |                          | germana lago                                    |
| Neiße (de),<br>Nisa (pl) |                                       |                                   | Niso <sup>27</sup>       |                          | nomo de pluraj<br>riveroj en Silezio            |

Krome kompreneble eblas simple ne asimili la nacian skribon de la propraj nomoj. Transskribo al pure esperanta formo tamen estas dezirinda almenaŭ, kiam la vorto aperas en kunmetoj kiel Ejfelturo (en Parizo) aŭ Halstejn-doktrino (politika strategio de FRG kontraŭ

<sup>17</sup> PIV.

<sup>18</sup>

<sup>19</sup> PIV.

<sup>20</sup> PIV, Z, GWED.

<sup>21</sup> LK.

<sup>22</sup> PIV.

<sup>23</sup> GWED, malpreferata formo.

<sup>24</sup> GWED, preferata formo.

<sup>25</sup> PIV, LK.

<sup>26</sup> LK.

<sup>27</sup> GWED, LK.

iama GDR en la 1960aj jaroj), aux se el propra nomo estas derivita ecx propra vorto (ejnstejnio).

Plia aspekto estas, de kiu lingvo oni deiru en la fonema transskribo: cxu de la origina germana prononco aux de la angla (Einstein ja farigxis usonano kaj mortis tie) aux franca (Eifel estis franca arkitekto)? En la supre menciita ekzemplo Niso oni simple ne deiris de la germana formo, sed de la pola kaj cxehxa „Nisa“, pli facile asimilebla al Esperanta vesto.

Pri la aparta problemo transskribi la komencon de la germandevena vortoparto -stein per -sxt- (Lihxtensxtejn) aux -st- (Ejnsteno) vd. § xx.

### § 30. Transskribo de germana umlauxto „ü“:

|            |            |           |  |
|------------|------------|-----------|--|
| Düsseldorf | Duseldorfo |           |  |
| Münster    |            | Monastero |  |
| München    | Munkeno    |           |  |

### § 31. Transskribo de germana umlauxto „ö“:

|            |                    |                    |      |
|------------|--------------------|--------------------|------|
| Königsberg | Kenigsbergo [PIV2] | Konigsbergo [ziko] | urbo |
|------------|--------------------|--------------------|------|

### § 32. Transskribo de la germana „ch“

|                      |         |                 |                     |
|----------------------|---------|-----------------|---------------------|
| Aachen („hx“)        | Akeno   |                 | urbo                |
| Bach („hx“)          |         | Bahxo           | komponisto          |
| Bacharach            |         | Bahxarahx       | urbeto cxe la Rejno |
| Liechtenstein („jx“) |         | Lihxtenstejn ?? | sxtato              |
| München („jx“)       | Munkeno |                 | urbo                |

### § 33. Transskribo de germana „st-“: La Lihxtenstejn/Lihxtensxtejn-problemo

### § 34. Transskribo de angla aux germana radikfina -er: La „kocxero/kocxisto-problemo“

Pri la pulovero/pulovro-problemo vd. jam § xxx. Tie cxi ni volas trakti jenajn vortojn:

|                   |          |                     |               |
|-------------------|----------|---------------------|---------------|
| grenader/o [PIV2] | grenad/i | grenad/ist/o [PIV2] | Grenadier     |
| kocxer/o [?a OA]  | kocx/i   | kocx/ist/o          | Kutscher      |
| lider/o [EPol]    |          |                     | leader, líder |

Tie cxi efikas la de Karolo Picx' priskribita principo de retro-evoluo: La naturisma formo kocxero estas senigita de sia etnolingva sufikso -er, kiu havas en la germana cxe kelkaj vortoj la saman funkcion kiel la Esperanta -ist. Restas do kiel radikoj kocx/, kiu sxangxas la gramatikan klason de substantivo al verbo. Poste estas mekane aldonita la kutima pure Esperanta sufikso -ist kaj pro tio kocxisto.

§ 35. Transskribo de „ts“: La „Botsvano/Bocvano-problemo“

§ 36. Cxu asimili aux traduki etnolingvajn komponentojn signifantajn „-urbo“: La Brigntaxno-problemo

|              |                      |                  |
|--------------|----------------------|------------------|
| Bridgetown   | Brigntaxno           | Brigxurbo [PIV2] |
| Léopoldville | Leopoldvilo [EBulg]  | Leopoldurbo      |
| Libreville   | Librevilo [ERus, PM] |                  |

**J. Problemoj de transskribo el la franca**

§ 37. Franca *oir*

|       |               |        |              |
|-------|---------------|--------|--------------|
| Loire | Luaro [NePIV] | Luxaro | Ligxero [LA] |
|       |               |        |              |

§ 38. Franca -ll-: La *Versaille*-problemo

Versajlo

**K. Problemoj de transskribo el la helena**

Detale: Vilborg 1961.

**L. Problemoj de transskribo el la hispana**

Golden, Bernard. Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj. En: Serta, p. 235-257.

Golden, Bernard. Asimilado de hispanlingvaj etimoj finigxantaj per -s. En: Boletín 1995:320 (mar-apr), p. 18-19.

Golden, Bernard. Gxustigo de kelkaj mise transskribitaj hispanlingvaj loknomoj en posxatlaso de la mondo. En: Interlingvistiko. Esperantologio. (Kunmetis Violin Oljanov). Sofio: Bulgara E-ista Asocio 1985, p. 196-201.

Régulo Pérez, J. Hispanidaj neologismoj en Esperanto. En: Esperantologio 1949:1:1.

§ 39. Transskribo de hispana -ll-: La *Sevilla*-problemo

| hispana  | fonetisma transskribo | grafisma transskribo | signifo      |
|----------|-----------------------|----------------------|--------------|
| caudillo |                       |                      |              |
| Sevilla  | Seviljo               | Sevilo               | Hispana urbo |
| tequilla | tekijo                | tekilo               | agarv-brando |

§ 40. Transskribo de hispana gu-

## **M. Problemoj de transskribo el la japana**

Kawasaki 1950.

## **N. Problemoj de transskribo el la latina**

Wüster, EV, Enkonduko

## **O. Problemoj de transskribo el aliaj lingvoj**

Kawasaki 1950.

### **§ 41. Transskribo per „i“ aux „j“**

|             |  |            |               |
|-------------|--|------------|---------------|
| Sierraleone |  | Sjeraliono | Afrika sxtato |
|             |  |            |               |

### **§ 42. Transskribo de „h“ post konsonanto: La siko/sikho-problemo**

Waringhien en enkonduko al PIV.

### **§ 43. Akronimoj**

Akronimoj estas mallongigoj farigxintaj elparoleblaj vortoj. Senprobleme internaciaj akronimoj kiel radaro aux modemo estas akceptitaj laux la 15a regulo ankaux en Esperanto. Pridisputate estas, cxu Esperanto mem kreu proprajn akronimojn. Multaj estis proponitaj en la kampo de komputado: codoromo (CD-ROM), -ap/ (aplika programo; vd. § xxx) xxx. Precipe Eichholz en la Bildvortaro kaj en Pekoteko multe uzis tiun metodon. xxx cxu kovrita de la 15a regulo? Cxu volapukajxoj? xxx

### **§ 44. Sufiksoj**

Simile disputata estas, cxu xxx

-ator/

-ap/

-enz/

-ab/

## P. Literaturo

2002-09-14

**Blanke**, Detlev. Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin (Ost): Akademie-Verlag **1985**.

**Christaller**, Paul. 1923.

**Eichholz**, Rüdiger (red.). Perkomputora Termino-Kolekto. 3 vol. Bailieboro, Ontario: esperanto press **1992**.

Filip 1947.

**Golden**, Bernard. La historio de "fakelo" en Esperanto. En: Akademias Studoj **1988-90**, p. 110-114.

**Golden**, Bernard. Problemoj rilate la esperantigon de La Coruna. En: Boletín de la Federación Española de Esperanto **1993**:313 (nov-dec), p. 19-20.

**Grosjean-Maupin** el **1924**.

**Kalocsay**, K[álmán]; **Waringhien**, G[aston]. Plena Analiza Gramatiko. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 4a eld. **1980** (cit. **PAG**).

**Kawasaki**, Naokazu. Esperantigaj principoj de japanaj vortoj. En: Esperantologio, vol. 1, n-ro 2, **1950**, p. 88-97.

**Makking**, G.F. Nia Fundamento sub lupeo. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo **1990**.

**Nitsch**, Gangolf. Sprachentwicklung und Neologismen im Esperanto. Graz: "Pro Esperanto" **1989**.

**Pabst** en AkSt 1988-90.

**PAG**. Vd. Kalocsay, K[álmán]; Waringhien, G[aston]. Plena Analiza Gramatiko.

Picx, Karolo. En:

Piron, Claude.

PIV. Vd. Waringhien, Gaston (red.)

Sxulco, Rikardo.

**Sxulco**, Rikardo. Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus. Gerlingen: Bleicher.

**Schlüter**, enkonduko al Inversa Vortaro.

**Waringhien**, Gaston (red.). Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda **1970** (cit. **PIV**).

**Vatré**, Henri. Neologisma Glosaro. Saarbrücken: Iltis. 2a eld. **1987**.

Welger, Helmut.

**Vilborg**, Ebbe. Esperantigo de grekaj nomoj. En: Esperantologio, vol. 2, n-ro 2, **1961**, p. 152-158.

**Zamenhof**, L[azaro] L[udoviko]. Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto. Rickmansworth: The Esperanto Publishing Company Limited. Fotorepreso **1969** de 17a eld. **1954**.

**Zamenhof**, L[azaro] L[udoviko]. Fundamento de Esperanto. Kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de A. Albault. Pizo: Edistudio. 10a eld. **1991**.